

Johann Wolfgang von Goethe,
Kanto de la spiritoj super la
akvoj

tradukita de Karl Jost

La homa animo
similas al akvo,
de l' ĉielo ĝi venas,
al ĉielo ĝi iras,
kaj devas denove
reveni al tero,
daŭre ŝanĝante.

Torrente de l' alta
kruta rokvando
pura la akvo
ĉarme disŝprucas
je nubondoj
sur glatan rokon,
kaj facilkviete
fluas nubvuale,
murmure
en la profundon.

Se staras rifoj
al falo kontraŭe,
ĝi ŝaŭmas kolere,
ŝtup-al-ŝtupe
abismen.

Nun malrapide
ĝi trarampas la valon,
kaj en glata la lag'
respegulas sin.
ĉiuj la astroj.

Vent' estas al ondo
ĉarma kunulo;
vent' kirlas el fundo
ŝaŭmantajn ondegojn.

Animo de l' homo,
vi similas al akvo!
Sorto de l' homo,
al vent' similas ja vi.

...

Johann Wolfgang von Goethe,
Kanto de la spiritoj super la akvoj

tradukita de Willy Nüesch

La homanimo
Similas al akvo:
De l' ĉielo ĝi venas,
Al ĉielo ĝi iras,
Kaj infren ree
Al tero ĝi devas,
En ŝanĝo eterna.

Kiam de l' alta,
Kruta rokmuro
Fluas la pura radio,
Ĝi polvas plaĉe
En nubaj ondoj
Al glata roko,
Kaj mildakceptite
Ĝi ondas vuale,
Softmuĝe
Al la profundo.

Kaj se rifoj
Kontraŭas la falon,
Ĝi ŝaŭmas indigne
Ŝtup-post-ŝtupe
Abismen.

En malprofunda fluejo
Ĝi rampas tra l' valo herbeja,
Kaj en la glata lago
Paŝtas sian vizaĝon
Astroj ĉielaj.

Vent' 'stas amanto
Ĉarma de l' ondo,
Vent' miksas funde
Ondojn ŝaŭmantajn.

Vi, homa animo,
Similas al akvo.
Vi, sorto de l' homo,
Similas al vent'.

...

*Traduko de la Germana poemo “Gesang der Geister über den Wassern” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de KARL JOST (*1876 – †1952).*

Arg-504-989 (2010-01-11 12:54:14)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la revuo “Heroldo de Esperanto”, n-ro 9 (1144), 27-a jarkolekto, de l’ 1-a de junio 1951. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.literaturo.dk/spiritoj.htm>. S-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, Danio, lars.kromann@mail.dk) enmetis ĝin tien. Karl Jost estis tre aktiva Esperantisto loĝinta en la svisa urbo Zuriko. Li estis kunfondinto de la Zurika Esperanto-Societo kaj verkis multajn tradukojn, lerno-libron de Esperanto kaj aliajn Esperantaĵojn. Vidu ankaŭ la retejon www.planlingvoj.ch

*Traduko de la Germana poemo “Gesang der Geister über den Wassern” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, *1927-05-09).*

Arg-504-1025 (2013-08-28 18:48:20)

La tradukinto Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poemtradukojn en la interreta poem-kolekto “Argiope.poezio.net”.